# NATURISTA VIVO

Oficiala organo de INOE (Internacia Naturista Organizo Esperantista)
Red.: *Jozefo NÉMETH*
*naturista.vivo@gmail.com*
*www.esperanto-naturismo.org*
Serio de la dua jarcento, 2020-03-31
**N-ro 137. (1/2020)**


## Antaŭparolo

Ni esperas ke INOE-membroj, kaj niaj esperantistaj, naturistaj kaj aliaj geamikoj daŭre fartas bone en la nuna sankrizo. Ni esperas, ke la plimulto inter ni kaj niaj geamikoj travivos la krizon sendomaĝe. Niaj pensoj estas kun la nunaj malsanuloj de la kronviruso, kun la viktimoj kaj iliaj parencaro kaj amikaro.

Bedaŭrinde, ni informiĝis, ke Filippo Franceschi, membro de INOE la 27-an de marto 2020 en sia 89-a vivojaro forpasis pro la kronviruso. Li estis konata en Esperantujo kiel Sen Rodin, itala instruisto, fotisto, ĵurnalisto, hortikulturisto kaj esperantisto ekde 1940. Li forpasis nur kvar tagojn post la morto de sia edzino Júlia Sigmond. La estraro de INOE kaj ĉiuj membroj kondolencas ilian familion.

## Varbu pri naturismo! Varbu pri Esperanto!

La valoroj de naturismo kaj la valoroj de Esperanto tute kongruas. Ili celas rilaton kaj respekton de aliuloj per rimedoj de la internacia lingvo kaj de nudeco respektive.

Pro tio, homoj kiuj parolas Esperanton ofte estas sentemaj pri argumentoj por naturismo: ili celas simplan vivon kaj ofte interesiĝas pri naturaj aspektoj de naturismo. Simetrie, homoj kiuj praktikas naturismon, ĝenerale bone komprenas la kialojn por havi kaj uzi neŭtralan internacian lingvon.

Multaj inter ni alparolas amikojn en naturista aŭ esperantista medio pri Esperanto aŭ pri naturismo. La efiko estas varia: inter miaj amikoj, kelkaj naturistoj iĝis esperantistoj kaj kelkaj esperantistoj iĝis naturistoj. Eĉ pli

interese, organizantoj de naturistaj agadoj nun rilatas kun la Esperanta movado kaj organizantoj de esperantistaj agadoj malfermas sin al naturismo! Tio okazas nun en Francio kaj se ĉiu inter ni parolas pri naturismo kaj Esperanto al siaj amikoj, la kunlaboro inter naturismo kaj Esperanto baldaŭ okazos en multe da lokoj.

Jam lastan oktobron, INOE-naĝantoj estis invitataj partopreni la internacian naĝkonkurson en Parizo, evidentigante, ke internacia kaj franca naturistaj organizoj komprenas la valoron de Esperanto en naturista medio.

En julio 2020, FFN (Franca Federacio pri Naturismo) organizos sian unuan festivalon. Ili elektis tute Esperantan lokon: la Kastelon Greziljono! La evento eĉ nomiĝas „Naturist' por nova mondo" en Esperanto kaj enhavos diversajn aspektojn pri naturismo. Kompreneble, INOE havos budon por varbi pri Esperanto ĉe la naturistoj.

Tuj post la FFN-festivalo, la Kastelo Greziljono, unu el la ĉefaj Esperantaj kulturejoj, organizas sian unuan naturistan eventon: la Verdan Naturisman Semajnon, kiu kunligas naturismon kaj Esperanton. La anoncita celo de la semajno estas „Simpla, parola komunikado ĉiutaga en etoso ĝoja, ludema kaj feriema".



*Naturismo en Murphy's Beach, Havajo*

*Foto de Leif* H*EILBERG* *(Usono)*

La detaloj pri la eventoj aperas en la sekva artikolo en tiu ĉi eldono de Naturista Vivo kaj estos ĝisdatigitaj sur nia retejo www.esperanto-naturismo.org en la sekcio „Estontaj agadoj”.

Tiuj du eventoj evidentigas, ke kiam ni alparolas niajn naturistajn amikojn pri Esperanto kaj kiam ni alparolas niajn esperantistajn amikojn pri naturismo, ili povas iĝi tiel entuziasmaj, ke ili mem organizos agadojn kunligantajn Esperanton kaj naturismon!

Se ĉiu inter ni tion faras, ni baldaŭ vidos pli kaj pli da ligoj inter Esperanto kaj naturismo!

*Thierry SPANJAARD (N-ro 778, Francio)*

# Jarraporto de la kasisto/redaktoro pri 2019

Fine de 2019 ni havis 51 individuajn membrojn (same kiel en 2018), plus la revuo estis sendata al 4 pliaj adresoj/abonantoj (UEA, FEL, Viena E-Muzeo kaj Germana E-Biblioteko.) Kelkajn abonantojn mi forigis el la dissendolisto dumjare, ĉar ili ne pagis eĉ por 2018. Ankaŭ inter la restintaj 51 membroj estas 8 membroj, kiuj ne pagis por 2019. La nunan numeron ili ricevos nur en la kazo, se la kotizo alvenos.

En 2019 mi ricevis artikolojn, fotojn aŭ almenaŭ reagojn de la sekvaj samideanoj: Rosy INAUDI, Marc GALLARDO, Chantal BEAUMONT, Didier LOISON, Thierry SPANJAARD (FR), Raymond DEMARCHE (BE), Christian WEBER (DE), Jerzy CZARNOHORSKI (PL), Ferdinand SIMON (BE), Vladimir ZUROMSKIJ (LT), Keneĉjo GOLDBERGO, Leif HEILBERG(+) (US). Dankon al ĉiuj kontribuintoj. Apartan dankon al mia ĉefa helpanto, Thierry SPANJAARD!

Komence de 2019 forpasis nia Prezidanto, Leif HEILBERG (vd. la rememorojn en NV 134). Lian taskon transprenis alia estrarano, Thierry SPANJAARD (FR).

En 2019 ni funkciigis Facebook-paĝon de INOE, kiu havas pli ol 300 ŝatantojn, ĝia adreso: *https://www.facebook.com/Internacia-Naturista-Organizo-Esperantista-1824678637805664/*. Krome ni kreis fermitan FB-grupon por INOE, kiu momente havas 15 membrojn (por aliĝi kontaktu la redakcion).

Dum UK 2019 INOE partoprenis Movadan Foiron kaj havis kunvenon (vd la artikolon de Marc Gallardo en NV 135 (p.1-3).

Thierry Spanjaard, la nova Prezidanto de INOE kreis la retejon *https://www.esperanto-naturismo.org/* por naturistoj, por e-istoj kaj por esperantistaj naturistoj kaj li helpis antaŭprepari nian novan statuton.

## Kaslibro 2019

**La 31-an de decembro 2018** ni havis en la kaso **116,09 EUR**.

**Enspezoj** en 2019: **750,22 EUR** (el tiu sumo 500,00 EUR venis el nia konto ĉe UEA).

**Elspezoj** en 2019: **495,69 EUR** (el tiu sumo pretigado, komputilaj kostoj: 70,14 EUR, poŝtkostoj 425,55 EUR). Videblas, ke la poŝtkostoj estis multoble pli grandaj ol la ceteraj kostoj. (Mi uzis farbujojn ne tiom bonkvalitajn, sed multe malpli kostajn ol antaŭ kelkaj jaroj).

**La 31-an de decembro 2019 ni havis en la kaso 370,62 EUR** (kresko en la kaso dum 2019: 254,53 EUR, sed fakte ne temas pri vera kresko en asocia nivelo, ĉar ni prenis monon el nia UEA-konto komence de la jaro).

## INOE-konto ĉe UEA (inoe-k) 2019

**Fine de 2018 ni havis en nia UEA-konto 3 308,60 EUR.** Komence de la jaro la kasisto prenis el la konto 500 eŭrojn kaj metis ĝin en la kason (vd supre), el kiu li pagas la pretigadon kaj dissendadon de nia revuo. Post la pago de nia asocia membreco en UEA (44 EUR), mendo de salono en UK (20 EUR) kaj ricevo de kelkaj membrokotizoj, **fine de 2019 ni havis en nia UEA-konto 3 015,17 EUR** (malkresko en nia UEA-konto: 293,43 EUR).

## Nia suma havaĵo 2019

**Nia suma havaĵo (kaso + UEA-konto) fine de 2019 estis 3 385,79 EUR, (**fine de 2018 ĝi estis **3 424,69 EUR**). Niaj elspezoj superis la elspezojn, **nia suma malkresko estas 38,90 EUR,** t.e. ni estas proksimume en ekvilibro, sed sciu, ke kelkajn elspezojn pasintjarajn ni ankoraŭ ne repagis al la Prezidanto de INOE. Ekde multaj jaroj ni ne altigis la membrokotizon, kio en si mem estas grava atingaĵo, sed ne estas certe, ke ni povos daŭrigi tiun tradicion en 2021.


**Pluspaginto/donacinto en 2019**: Juan-Antonio CABEZOS-MARTINEZ (ES).

**Subtenantaj Membroj en 2019** (duobla pago aŭ pli): Francois PACHOT, Patrick CHEVALIER, Thierry SPANJAARD (FR), Ferdinand SIMON (BE).

**Dumvivaj Membroj (25-obla pago aŭ pli):** Leif HEILBERG (+), E. WILLIGER (US), József NÉMETH, András LUKÁCS (HU), Anatolij IVAŜENKO, Valentin MELNIKOV (RU), Karel VALA (CZ), Ionel ONEȚ (NL), Sjoerd BOSGA (SE), ***Subtenanta DM:*** Nobuo SAKURAI (JP).

**Jen la membraro/abonantaro laŭlande fine de 2019**: Aŭstrio (1), Belgio (8), Brazilo (2), Britio (1), Ĉeĥio (1), Danlando (2), Estonio (1), Francio (14), Germanio (2), Hispanio (2), Hungario (3), Italio (2), Japanio (1), Koreio (1), Litovio (1), Nederlando (3), Pollando (2), Rusio (2), Svedio (2), Svislando (1), Usono (3). (*Ĝis la fino de la jaro mi forigis el la adresaro plurajn nepagintojn kaj forpasinton, komence de 2020 mi forigos pliajn*).

**Do, sume ni havis 55 membrojn/ abonantojn en 2019** (vd. 55 en 2018, 51 en 2017, 49 en 2016, 54 en 2015, 57 en 2014, 56 en 2013, 60 en 2012, 65 en 2011). El tiuj 55 tri ricevis la revuon senpage (UEA, E-Muzeo en Vieno kaj la redakcio de Monato), kaj 10 membroj estas Dumvivaj Membroj. En 2019 mi printis 55-60 ekz-ojn, la plusajn ekz-ojn mi uzis por varbado.
Por eviti la malkreskon mi petas niajn membrojn, ke ili instigu siajn naturistajn aŭ esperantistajn amikojn membriĝi en INOE.




*Jozefo NÉMETH (N-ro 533, Hungario), redaktoro / kasisto de INOE*

# INOE planas pli kaj pli da agadoj… kaj subtenas agadojn organizitajn de aliaj organizoj

**Bonvolu noti, ke kaŭze de la kronvirusa krizo, ĉiuj planitaj eventoj riskas esti prokrastitaj aŭ nuligitaj laŭ la sansituacio kaj la registaraj decidoj. Ĝisdatigita informo tuj aperos ĉe nia retejo www.esperanto-naturismo.org kaj estos printita en la venanta eldono de Naturista Vivo.**

Dum la venanta somera sezono (en la norda hemisfero), INOE planas multajn agadojn. Nun ni havos diversaj tipojn de agadoj:

- Kiel kutime ni alkroĉas nian agadon al naturistaj aŭ esperantistaj eventoj,
- INOE organizas sian memstaran eventon, en oktobro en Hispanio,
- Aliaj organizoj planas eventojn kunligantajn Esperanton kaj naturismon, en kiuj ni kompreneble partoprenos.

Ni esperas ke multe da INOE-anoj ĝoje partoprenos en multaj el la proponataj agadoj.

### Semajnfino en Genezo - de la 21-a ĝis la 24-a de majo

INOE partoprenas en la evento organizita de ANP (*Association Naturiste Phocéenne – Naturista Foceana Asocio*) kaj interreta forumo *Vivre Nu* (*Vivi nude*) kaj alportas iom da ekzotaĵo tra Esperanto! La renkontiĝo okazos en naturista centro Genezo en Francio kaj inkluzivos renkontiĝojn, piediradojn, kajakadon, naĝon (en rivero kaj naĝejo), nudan esploradon de kavernoj, viziton de kastelo kaj aliajn aktivaĵojn...

INOE havos sian kunvenon kaj proponos enkondukon al Esperanto por neesperantistoj.

Kontaktu nin por ricevi la detalojn por partopreni.

### Naturista Festivalo en Kastelo Greziljono – la 18-an kaj 19-an de julio

FFN (Franca Federacio de Naturismo) organizas sian unuan festivalon en emblema esperantista loko: la Kastelo Greziljono, alie nomata "la Kulturdomo de Esperanto". Krome la FFN eĉ nomas sian eventon "Naturist' por nova mondo" en Esperanto! La semajnfino enhavos multajn naturistajn

sportajn kaj kulturajn aktivaĵojn kaj informojn pri asocioj. Inter ili, INOE havos budon, kie ni prezentos nian asocion kaj la internacian lingvon.

Aliĝoj estas tra la FFN, per la ligilo kiu estas sur nia retejo ĉe https://www.esperanto-naturismo.org/post/2020-07-18-19-naturista-festivalo-en-esperanta-kastelo aŭ rekte ĉe https://tinyurl.com/qrwy73u.

## Verda Naturisma Semajno en Greziljono – de la 20-a ĝis la 24-a de julio

La Verda Naturisma Semajno estos organizata de la Esperanto-Kulturdomo kun la subteno de INOE. Ĝi okazos en la Kastelo Greziljono, en Francio de de lundo, la 20-a de julio, ĝis vendredo, la 24-a de julio. La semajno estos dediĉata kaj al naturismo kaj al Esperanto. Ĝia temo estas „simpla, parola komunikado ĉiutaga en etoso ĝoja, ludema kaj feriema”.

INOE tute subtenas la projekton. Tiu evento okazos unuafoje tiun jaron, se sufiĉe da homoj partoprenas, ĝi povos iĝi ĉiujara!

Vi jam povas aliĝi sur la retejo de la Esperanta Kulturdomo ĉe http://gresillon.org/spip.php?article225 aŭ legi kromajn detalojn en nia retejo.

## Agado dum la 105-a Universala Kongreso en Montrealo – de la 1-a ĝis la 8-a de aŭgusto

La 105-a Universala Kongreso estos granda evento por kunigi esperantistojn! Por ni, estos bona oportuneco interrenkonti kaj konigi naturismon al pli da esperantistoj.

*Movada Foiro – la 1-an de aŭgusto*

La Movada Foiro okazos, kiel kutime sabate, komence de la kongreso. INOE havos tablon por prezenti naturismon kaj ĝiaj valoroj kaj por varbi pri nia asocio kaj ĝia agado. La Movada Foiro estos la lasta eblo por aliĝi al nia ekskurso (vidu sube) sed des pli frue vi aliĝos, ju pli la prezo malaltos.

La Movada Foiro okazos sabaton la 1-an de aŭgusto en la halo de la Kongresejo (en hotelo Sheraton).

*Ankaŭ la hundo estas naturisto… (Rusio)*

*Foto de Leif* H*eilberg* *(Usono)*

*INOE-kunveno*

Kiel kutime, la membroj de INOE kaj nemembroj, kiuj interesiĝas pri naturismo, kunvenos dum la 105-a Universala Kongreso en Montrealo. La organizantoj de la Kongreso ankoraŭ ne informis nin pri salono, kaj la tago kaj horo de nia kunveno. Ĉio estos anoncita en la programo de la UK kaj ĝisdatigita sur nia retejo.




*Ekskurso al naturista centro La Pommerie – la 5-an de aŭgusto*

INOE organizas ekskurson al naturista centro proksime de Montrealo, dum la ekskursa tago (merkrede) de la kongreso. La ekskurso daŭros la tutan tagon. Ni foriros de la ĉefenirejo de la kongresejo je la 10a matene (akurate!), tagmanĝos nude surloke kaj havos eblecojn sperti la multajn lokajn aktivaĵojn posttagmeze. Ni revenos al la Montreala urbocentro vespere.

La aliĝilo estas kunmetita kun tiu eldono de Naturista Vivo kaj ankaŭ haveblas sur nia retejo ĉe https://www.esperanto-naturismo.org/post/2020-08-05-ekskurso-al-naturista-centro-la-pommerie.

La Pommerie estas bela kaj bone konata naturista centro proksime al Montrealo. Ĝi ofertas multajn aktivaĵojn: naĝejon, nudpiediradojn, tenison, volejbalon kaj petankon, kaj kompreneble la eblon pasigi tempon nude por babiladi … Ankaŭ eblos ricevi masaĝojn, se ili estas rezervitaj.

Indas, ke ni organizu tiun ekskurson kun granda sukceso, ne nur por kunvenigi la nunajn membrojn de INOE sed ankaŭ por proponi al ĉiuj kongresanoj havi la sperton de naturismo almenaŭ dum unu tago! Do ne hezitu varbi pri ĝi!



**Restado en naturista centro Templo del Sol – de la 3-a ĝis la 11-a de oktobro**

INOE nun proponas memstaran eventon: ni pasigos unu semajnon kune en naturista centro. La celo estas kunigi la naturistajn esperantistojn kaj pasigi bonan ripozigan tempon en belega kaj sunplena naturista etoso.

Templo del Sol situas en Katalunio, Norda Hispanio. Ni estos tie komence de oktobro, por ĝui la agrablan veteron sen esti ĝenata de la granda homamaso de la somero.

Vi povas aliĝi simple sendanta viajn informojn al Rosy Inaudi, sekretariino de INOE. Ŝi bezonas: familian nomon, nombron de homoj, elektitan loĝejon, retadreson, telefonnumeron, landon de origino, kaj vojaĝrimedon kaj planoj. La prezoj por lupreni loĝejon troveblas ĉe la retejo de Templo del Sol.

Bonvolu aliĝi frue por ke ni bone kaj efike organizu la semajnon.

**Internacia naturista naĝkonkurso en Torino – de la 23-a ĝis la 25-a de oktobro**

INF-FNI (Internacia Naturista Federacio) organizas sian kutiman internacian naĝkonkurson, kiu okazos en Torino, Italio de la 23-a ĝis la 25-a de oktobro 2020. Bonvolu rezervi la datojn en via kalendaro, pli da detaloj venos poste.

# 205 argumentoj kaj observaĵoj subtenantaj naturismon

*vaste dokumentita kun citaĵoj, referencoj, subtenantaj esploroj kaj rimedoj por kromaj studoj kompilita de K. Bacher, 1996*

**Naturismo precipe kongruas kun feminismo kaj lukto por virina libereco.** *(daŭrigo)*

86. Pornografio, siavice, limigas la kapablon de virinoj partopreni sanajn nudajn amuzaĵojn, kaj ordinare esti nuda en aliaj manieroj. Naturismo rompas la potencon de pornografio super virinoj.
Kiel menciite antaŭe, en multaj lokoj estas laŭleĝa ekspozicii *Penthouse* sur bretoj de magazenoj, tamen estas kontraŭleĝa, ke virino publike nudigu siajn mamojn por nutri bebon.
Pornografio serĉas „liberecon", precipe „esprim-liberecon". Sed akcepto de pornografio limigas la rajton de virinoj por iri nudbruste aŭ nude por sia propra ĝuo. Ĝi limigas la liberecon regi ilian propran korpon, kaj silentigas ilian propran liberecon de memesprimo. Nia pornografia kulturo kontribuis al sintenoj, kiuj ofte malinstigas virinojn eĉ provi vesta-opcian amuzaĵon, kvankam naturismo estas laŭ multaj manieroj la antitezo de pornografio.

87. La lukto por libereco devas signifi civilajn rajtojn por virinoj – ne licencon por pornografoj.

88. Vestaj modoj kaj laŭleĝaj postuloj historie kontribuis al la subpremo de virinoj.
Ekzemple, meze de la 19-a jarcento, eta talio estis konsiderata kiel signo de beleco, kaj, por atingi ĉi tiun normon, virinoj ligis sin al korsetoj kreitaj por

premi la stomakon (kaj aliajn internajn organojn) enen kaj supren, kreante la aspekton de eta mezo. Krome, virinoj surmetis ĝis dek kvin tavoloj da subvestoj kaj krinolinoj sub siaj longaj jupoj. En la lasta duono de la jarcento aldoniĝis kromaj subvestaĵoj por la aspekto de pleneco. La pezo de ĉi tiu muntado proksimiĝis al 20 funtoj. Ni nun scias, ke multaj el la fizikaj trajtoj asociitaj kun la "malforta sekso" rezultis el tiaj limigaj vestaĵoj, inkluzive de „birdaj” apetitoj, tendenco al sorĉoj de senkonsciiĝo kaj reduktita fizika aktiveco. Thorstein Veblen observis, ke „la korseto estas en ekonomia teorio fakte [instrumento de] kripligo por la celo malaltigi la vivecon de la homo kaj igi ŝin persone kaj evidente ne taŭga por laboro”. Vario de spiraj kaj reproduktaj malsanoj (inkluzive de oftaj spontanaj abortoj) el kiuj virinoj iam suferis estis rekte ligitaj al la malsanaj diktoj de la modo „sablhorloĝo”. Multaj el la asocioj de ina delikateco, kiuj havas siajn radikojn en la 19-a jarcento, restas ĉe ni hodiaŭ, kvankam ili nun estas sensencaj.

**Naturismo estas pli natura ol vestaĵobsedo**

90. Naturismo, kiel festo de la natura homa korpo libera de artefarita modo, tre kongruas kun la idealoj de natura, simpla, kaj ekologia vivmaniero.

91. Dum ni laboras por la bono de la naturo, ni devas ankaŭ labori por la bono kaj la libereco de niaj korpoj, precipe ĉar ĝi povus esti integrita kun la resto de la naturo.
Kiel la Kebekia Naturisma Federacio observis, "Naturo ne nur estas la arboj; ĝi estas ankaŭ niaj korpoj."

92. La celoj de naturismo kaj ekologiismo ofte estas paralelaj. Same kiel ekologiismo, naturismo kutime celas konservi la naturan karakteron de pejzaĝoj kaj kontraŭas disvolviĝon kaj komercan ekspluatadon. La plej granda risko por la plej multaj plaĝoj ne estas nudeco, sed disvolviĝo: la ekkapto de senvaloraj publikaj areoj fare de privataj feriejoj aŭ hoteloj.

93. Oni sentas sin multe pli parto de natura aranĝo nude ol vestita.

94. La nudisto estas multe pli senteble konscia, ĉar nudeco plibonigas respondecon kaj sensan sperton.

95. Vesto forigas nin de la natura mondo, malhelpante la haŭtan kapablon senti la medion. Ĝi fakte malfunkciigas nian kapablon senti la naturan medion, per artefarite iritado de la haŭto.
Paul Ableman skribas, „se primitivuloj perdis sian kulturon [per esti vestitaj de misiistoj], ili ankaŭ perdis sian medion. Ili perdis la sunon, la pluvon, la herbon sub la piedoj, la foliaron, kiu brosis sian haŭton dum ili moviĝis tra arbaro aŭ ĝangalo, la akvon de lago, rivero aŭ maro glitanta preter iliaj korpoj, antaŭ ĉio la senĉesan komunecon kun la vento. Iu ajn kiu pasigis tempon nuda ekstere scias, ke la ludado de la elementoj sur la korpo produktas ĉiam ŝanĝiĝeman respondon, kiu eble preskaŭ atingas erotikan intensecon. La haŭto fariĝas viva kaj respondema kaj tute nova spektro de sento estas generita. Vestu la korpon kaj ĉi tiu riĉa komunumo estas anstataŭita de nura forta, kaj ofte iritanta kontakto kun inerta ŝtofo. Ĝi estas grandega sensa malriĉiĝo kiu povas eble plej bone esti juĝita pro la malvolemo de la indiĝenoj de Tierra del Fuego, kiuj vivas en klimato tiel severa, ke Darwin observis neĝon fandiĝantan sur la nudaj brustoj de virinoj, por adopti protektan tukon. Ili preferis haŭtan kontakton kun la medio, eĉ malamika, al la perdo de sento sekvanta el la surmeto de vestaĵoj”.

96. Vestaĵobsedo ne akordiĝas kun la ŝablonoj de naturo, kiel esprimitaj de ĉiuj aliaj membroj de la besta regno. Homo estas la sola specio kiu sin vestas.

97. Iuj psikologoj opinias, ke homoj parte inventis vestaĵojn por sin apartigi de bestoj.
Fred Ilfeld kaj Roger Lauer skribas: „La ĉefa celo de homo estas supereco ... kaj unu el manieroj, per kiu li strebas, estas per vestaĵoj. Vestaĵoj ne nur protektas kaj ornamas, sed ankaŭ donas staton al la surmetanto, ne nur kun respekto al samuloj, sed pli grave rilate al la situo de homo en la naturo. Vestoj aperigas homon malpli kiel besto kaj pli kiel dio kaŝante siajn seksajn organojn”. Lawrence Langner aldonas: „Moderna homo estas puritano kaj ne pagano, kaj per sia vestaĵo superas sian senton de honto rilate al siaj seksaj organoj publike en miksita grupo. Li faris tion transformante sian bazan malsuperecon en senton de supereco, rilatante sin al Dio, en kies senseksa bildo li asertas esti farita. Sed demetu ĉiujn liajn vestojn, kaj estas simple vidi, ke li estas duon-dio, duon-besto. Li ludas du kontraŭajn rolojn, kiuj kontraŭdiras unu la alian, do la rezulto estas konfuzo.”

98. La fizika baro de vestaĵoj plifortigas psikologiajn barojn, kiuj disigas nin de la natura mondo.
En nia vestaĵa-obsedita socio, ni tiel malproksimigis nin de la naturo, ke la vidado de nia propra natura stato ofte estas timiga. Allen Ginsberg skribas: „La vero eble ĉiam povas iom surprizi nin, ĉar ni estas kreitaĵoj de kutimo, precipe en nia hipermekanigita, hiperindustriigita, hipermilitecigita socio. Ĉiu prezentado de la naturo povas ŝoki.”

99. Vivstiloj nekongruaj kun la ŝablonoj de la naturo (inkluzive de vesto-obsedo) povas esti psikologie damaĝantaj.
Robert Bahr skribas: „Nudeco estas la natura stato de la homaro; vestaĵoj trudas baron inter ni kaj Dio, naturo, universo, kiu utilas por malhumanigi nin ĉiujn.”
„Paradokse”, aldonas Jeremy Seabrook, „La propra ĉeesto de la okcidentanoj [sur nudaj strandoj] en la sudo estas esprimo de ia manko en iliaj ĉiutagaj vivoj. Fakte, tutaj industrioj sindediĉas al rajtigado de homoj ’foriĝi de ĉio’. De kio, precize, ili volas foriri, kiam la ikonografio de ilia kulturo estas reklamita tutmonde kiel provizanto de ĉio? Multaj agnoskos, ke ili serĉas ion ne haveblan hejme (krom sunbrilo), ion rilatanta al aŭtentikeco, stato de ’malfuŝeco’ ... Ilia kultura heredaĵo estis forprenita; pro tiu ili devas aĉeti tion, kio devus esti la naskiĝrajto de ĉiuj homoj: sekura ankrado en festoj kaj ritoj, kiuj samtempas al signifaj momentoj de niaj homaj vivoj.”

100. Naturisma vivmaniero estas pli ekologia respondeca. Ekzemple, la eblo esti nuda dum varma, humida vetero malpliigas la bezonon de klimatizado. Plej multaj klimatiziloj uzas terurajn kvantojn da energio, kaj multaj uzas frigidajn likvaĵojn damaĝantajn al la stratosfera ozono-tavolo.

101. Vesto estas produktita per ekologiaj nerespondecaj procezoj el medie nerespondecaj fontoj.
Ekzemple, sintezaj ŝtofoj disvolviĝas el oleo; kaj kotono estas kreskigita per intensaj agrikulturaj teknikoj uzantaj pesticidoj. Kotono konsistigas la duonon de la tekstila konsumo de la mondo, kaj estas unu el la kultivaĵoj plej ŝprucita per pesticidoj en la mondo. Vestaĵa fabrikado ankaŭ povas inkluzivi kloritan blanĉadon, kemian tinkturadon, sigelon per metalaj komponaĵoj, finpreton per rezinoj kaj formaldehido, kaj galvanoplastikon por rezistigi zipojn de rusto, kreante venenaj restaĵoj en rubakvo.

*Esperantigita de Thierry Spanjaard (N-ro 778, Francio)*

**MONATO – *internacia magazino sendependa*.** Nun vi povas malfermi vian mondon kaj ricevi la magazinon dum 3 monatoj senpage. Por pliaj informoj vizitu www.esperanto.be/fel/mon/abonilo3.3.php aŭ skribu al *Monato, Flandra E-Ligo, Lange Beeldekensstraat 169, BE-2060 Antwerpen, Belgio*. Fakse: *+32 3 233 54 33*. Rete: *monato@fel.esperanto.be*

# ABONKOTIZOJ POR 2020

**Individuaj membroj/abonantoj en Eŭropo: EUR 15** (aŭ IRK 15).
**Ekstereŭropaj landoj:** surface **EUR 16**, aerpoŝte **EUR 17** (aŭ IRK 17).
Loĝantoj de malriĉaj landoj rajtas peti maks. 30%-an rabaton. **Paro**: +40%.
**Subtenanta Membro**: duobla kotizo. **Apoganta Membro**: grupo aŭ persono, kiu per kontribuoj deziras helpi al INOE. **Dumviva Membro**: 25-oblo de la aktuala kotizo.

**Pagmanieroj**:

- **Al la *Kasisto*: NÉMETH József, Fő u. 41/5, HU–8531 IHÁSZ, Hungario,** per monbiletoj, IRK-oj (en registrita letero!), per monsendo tra Western Union, aŭ per internacia poŝtmandato. Personan ĉekon ni ne povas akcepti! Vi povas sendi monbiletojn nur por via propra respondeco. Sendu la leteron registrite, kaj metu la monbiletojn inter netravideblajn foliojn.

**Se vi volas pagi per rekta interbanka ĝiro**, pagu al la konto de la kasisto (pri la kontonumero kaj ceteraj pagebloj demandu la redaktoron: *jozefo.nemeth@gmail.com).*

- **Pere de nia UEA-konto „*inoe-k*"** (informu ankaŭ la kasiston!)

Kontoj por rekte pagi al UEA (*pri ceteraj pagebloj vd. la Jarlibron*!):
*Belgio*: IBAN: BE54 0001 6318 3197, BIC: BPOTBEB1XXX;
*Germanio*: IBAN: DE51 3701 0050 0318 2915 09, BIC: PBNKDEFF;
*Nederlando*: IBAN: NL72 INGB 0000 3789 64, BIC: INGBNL2A;
*Svedio*: IBAN: SE95 9500 0099 6042 0074 3740, BIC: NDEASESS;
*Svislando*: IBAN: CH86 0900 0000 1200 2310 0, BIC: POFICHBEXXX

- **Francoj povas pagi al Didier LOISON** (ĉe Esperanto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris), *didier.loison@esperanto-france.fr*

- **Poloj povas pagi al Jerzy CZARNOHORSKI** (ul. E. Orzeszkowej 10/38, PL-43100, Tychy, Pollando), *jecza@wp.pl*

- **Nia peranto en Brazilo:** Brazila Esperanto-Ligo, SDS Ed. Venâncio III Sala 303, Brasília - DF, CEP 70.393-902, *bel-abonservo@esperanto.org.br*